

& Fraŭlina kanto:

< Ripete 17 el 50 batoj por strofo, entute 400 paŝoj dum 3 minutoj. Laŭ hungara popolkanto verkis Ernesto Geleta.>

(#Melodio:

<:50> /(DoDo MiDo SoSo LaSo FaMi Re Do o;)×

(FaSo La La a doTi La So o; do So MiDo SoSo LaSo FaMi Re Do o)×

)×8)+

(&Strofoj:

'1 /Venis al mi Esperanto-invitulo. ; Mi veturos ĉar mi estas amkaptilo. (; Ĉarmulino, facilino, ; Eble mi revenos kiel junedzino!)×

'2 Mi jam serĉis belan veston en la ŝranko. ; Certe venos el la buboj granda kvanto. (; Mia koro kaj la mamoo, ; Estas ĉiam preta por la nova amo!)×

'3 Mi la buŝon kaj okulojn plibeligas. ; Ekvidante virojn mi jam ĝoje ridas. (; Ridetante, koramante, ; Tio estas mia revo ekirante!)×

'4 En la mano por veturo la bileto. ; Mia cerbo pensas ĉiam je fileto. (; Bela bubo estu edzo, ; Kapti ĝojon, jen estas la grandebleco!)×

'5 Alportis min buso kaj la vagonaro. ; Al la urba, bela urba stacihalo. (; Tie estas renkontiĝo, ; Dolĉa kiso min atendas je la riĉo!)×

'6 Inter kisoj, la paroloj al mi sonas. ; Kaj la kisojn al la bubo mi redonas. (; Palpebrumas, koro predas, ; Ĉar mi jam en lia amo tute kredas!)×

'7 Akompano, amindumo sur la vojo. ; En la koroj ekloĝiĝis granda ĝojo. (; Freŝa vento, amkonsento, ; Ni rapide proksimiĝas al la venko!)×

'8 Tiel agi en la mondo estus paco. ; Ni ekvidis la preĝejon sur la placo. (; Ni kuregu al la pastro, ; La feliĉon dankas ni al Esperanto!)×)